

FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

Organo de FRANCA LIGO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ, filio de IKUE

===== LA HOUSSAYE-EN-BRIE (Seine-et-Marne) FRANCE =====

Redaktoro : S-ro Gaston VERON, pl. de la Petite Bruyère, DOMFRONT (Orne)
Sekretariino : F-ino J. LE BOEDEC, 18, rue Ernest Cresson, PARIS 14°
Kasisto : S-ro J. LIGOT, 30, rue Fernand Segouin, ARNOUVILLE-LES-GONESSE
C.C.P. - PARIS - 51 74 79 - (Seine-et-Oise)

Abonnement : 2 Fr- Adhésion à la Ligue : 1 Fr-; Total = 3 Fr--
=====

N° 61 BULLETIN TRIMESTRIEL ---- TRIMONATA BULTENO ----
Sankta Pio X, preĝu por ni. Aprilo 1964

KRISTO, NIA GLORA SINJORO

=====

(El la Agoj, II, 22-24, 32-36-)

...."Izraelidoj, aŭskultu la jenajn vortojn : Jesuon, la Nazaretanon, viron de Dio, elmontritan al vi per potencaĵoj kaj mirakloj kaj signoj, kiujn Dio faris per li meze de vi, kiel vi mem scias, lin, laŭ la difinita intenco kaj antaŭscio de Dio transdonitan, vi per la manoj de senleĝuloj krucumis kaj mortigis; lin Dio levis, malliginte la suferojn de morto, ĉar estis ne eble, ke li estu tenata de ĝi....

... ĉi tiun Jesuon relevis Dio, pri kio ni ĉiuj estas atestantoj. Levite de ĝis destre de Dio, kaj ricevinte de la Patro la promeson de la Sankta Spirito, li elverŝis tion, kion vi vidas kaj aŭdas. Ĉar David ne supreniris en la ĉielojn; sed li mem diris :

La Eternulo diris al mia Sinjoro :

Sidu dekstre de Mi,

ĝis Mi faros viajn malamikojn benketo per viaj piedoj.
Kun certeco do sciu la tuta domo de Israel, ke tiun Jesuon, kiun vi krucumis, Dio faris Sinjoro kaj Kristo.

+++++

{=}+{=}+{=}+{=}

XXXXXXXXXXXX

Bileto de la Prezidanto.

ESPERO KATOLIKA 1964.

En sa 61 e année, notre revue internationale paraît sous une nouvelle livrée. Ainsi est inaugurée une collection succédant à celles, interrompues seulement par les événements internationaux, qui, changeant parfois de forme, ont maintenu jusqu'à nous, sous un même titre, un même esprit.

En votre nom, chers amis de la Franca Ligo, qu'il me soit permis de rendre ici hommage à tous ceux, vivants ou morts, qui ont donné tant de leur temps, de leur coeur, de leur esprit, afin de perpétuer une présence chrétienne au milieu d'un Monde Espérantiste si vivant et divers.

L'actuel rédacteur de la revue, S-ro HOEN, souligne dans le dernier numéro la tâche qu'elle se trace : l'information objective de ses lecteurs sur les questions religieuses et sur les faits d'une signification universelle.

S'il est nécessaire que chacun de nous manifeste son soutien à notre organe en s'y abonnant, nous devons aussi participer à sa vie, en le lisant d'abord, mais aussi en le commentant, par le dialogue avec sa rédaction, par les suggestions que nous pouvons faire.

Il appartient à ceux qui ont quelque chose à dire, dans le sens d'une culture universaliste, du dialogue pour l'Unité des Chrétiens, des contacts pour l'amitié entre les peuples et pour la Paix, de l'exprimer dans un Espéranto clair et correct, de l'adresser à la rédaction.

En lisant l'intéressant article sur la Pologne de Pastro PARUZEL dans le N° de Février, je songeais à ce que des collaborateurs habituels ou occasionnels pouvaient apporter aux lecteurs, dans le sens d'une meilleure connaissance des autres pays ou peuples, d'un rapprochement, d'une amitié éclairée.

Notre bulletin, celui que vous avez entre les mains, est modeste. Il ne vise qu'à entretenir un lien entre les Espérantistes catholiques de notre pays, à leur donner quelques informations ainsi qu'aux sympathisants, à proposer de courts textes à lire. Mais il ne dispense pas ses lecteurs à s'abonner à la revue internationale dont les buts se confondent avec l'idéal qui les anime.

Si vous ne l'avez pas fait, envoyez sans retard le prix de votre abonnement à S-ro VERON, notre dévoué rédacteur que nous nous réjouissons de retrouver à ce poste, et que nous associons, dans un même merci, à S-ro MUFFANG, qui a assumé pendant tant d'années la tâche discrète et nécessaire de représentant de E.K.-

En continuant votre soutien, en propageant votre revue, en apportant une aide active au mouvement, en témoignant par la présence et l'attitude, vous serez le messager de l'apport chrétien au monde d'aujourd'hui, le Salut, l'Amour, la Paix.

R. Cl. COLAS.

=====

+++++

.....

GENERALA KUNVENO DE LA LIGO.

la 8-an de Marto 1964-a, en La Houssaye-en-Brie.

Laetare ... Gojante kaj en amikeco ni pasigis tiun belan dimanĉon en La Houssaye, ĉe la Fratoj Misiistoj de la Kamparoj. Post la paroĥa meso ni vizitis la priorejon, lernis pri la agado de niaj gastigantoj, babiladis, tabmanĝis.

La ĝenerala kunveno komenciĝis tridek minutojn post la dua, kaj daŭris unu horon kaj duonon; ok anoj partoprenis; la ceteraj bedaŭru.

S-ro LIGOT prezentis la kasistan raporton por la jaro 1963-a. Jen resumo de la spezoj :

	EN		EL
Kotizoj	278 Fr	Bulteno	120 Fr
Donacoj	149 Fr	Poŝtmarkoj	38 Fr
Vendo	6 Fr	Ĉekkonto	5 Fr
	<hr/>		<hr/>
	433 Fr		163 Fr
	=====		=====

La elspezoj superis la enspezojn per 260 Fr; ĉar ni posedis 267 Fr komence de la jaro, ni havis enkase post ties fino 540 Fr.-

Oni rimarku, kiom malaltaj estas la bultenkostoj (por komparo : 188 Fr en la jaro 1960-a), dank'al Frato MARMOU. Kelkaj novaj membroj prenis la lokon de la eksaj; kvankam ni kalkulas teorie 125 anojn, nur 110 kotizoj estis enkasigitaj. Konkluda citaĵo : "La nivelo ne malleviĝas, dank'al individuaj klopodado kreskanta de malkreskanta membro da personoj."

.....

F-ino LE BOEDEC raportis pri la vivo de la Ligo. La Komitato regule kunvenis ĉiun trian monaton en la sidejo de U.F.E., kutime la unuan dimanĉon de la monato antaŭ la apero de la bulteno. Tiu regule aperadis, sub fakta redaktoreco de la Komitato, ĉefe de F-ino LE BOEDEC. De nun S-ro VERON denove povos funkcii kiel redaktoro. Oni eldonas 250 ekzempleroj, el kiuj duono iras al la abonintoj, kaj proksimume 40 % estas senpage senditaj al kelkaj katolikaj gazetoj, movadoj aŭ unuopuloj, kaj al esperantistaj organizoj.

Dum sia lasta kunveno, la Komitato decidis altigi la kotizon de 2,5 Fr ĝis 3 Fr.- Venis la demando pri dumvivaj membroj; ĉar la statuto silentas pri tia kategorio, oni ne povas ilin enlasi; sed S-ro LIGOT bonvenigas dudekjaran antaŭpagon de la kotizoj.

Bone sukcesis la 19-an de Marto 1963-a nia pilgrimo al Longpont. La ĝenerala kunveno decidis fari el ĝi tradicion, laŭ invito de la paroĥestro, kaj oni proponos al li por ĉi tiu jaro la dimanĉon 21-an de Junio.

Rilatoj kun Espero Katolika : S-ro MUFFANG post multjara akurata funkciado eksiĝis kiel reprezentanto de I.K.U.E.- Lin anstataŭas S-ro VERON (kiu ankaŭ estas peranto por Vojo, Vero, Vivo.). En la gazeto aperis kvar artikoloj senditaj de nia Ligo. Krome F-ino LE BOEDEC kunlaboris kun S-ro HOEN por la biografio de Pastro Peltier.

.../...

Kun I.K.U.E. ni rilatas pere de du estraranoj, S-roj BESSIERE kaj COLAS. Tiu las ta donis kelkajn novaĵojn pri la revigliĝo de la Unuiĝo kaj pri diversaj okazaĵoj (nova statuto k;t.p.). Estas utile ke ĉiuj konigu siajn kritikojn kaj proponojn pri la agado de I.K.U.E. kaj pri la plibonigado de Espero Katolika. Oni atentu pri la nova kotizo : 15 Fr-; iuj francaj legantoj de E.K. ŝajne ne konas nian Ligon; al ili oni sendos la bultenon.

Pri La Alta Flugo raportis mallonge F. SIMONNET. Junaj francaj katolikaj esperantistoj sin konigu, kaj aliĝu al sia propra internacia asocio L.A.F.--. Frato MARMOU sciigis, ke ĝia bulteno Birdo momente ne plu aperas pro monaj kialoj.

F-ino LE BOEDEC petis, ke oni jam antaŭpensu pri la elekto de nova Komitato en la jaro 1965-a. Si mem ne povos rekandidatiĝi; neceso do nova Sekretari(in)o.

.....

Oni tuŝis ankaŭ diversajojn.

Nekonata donacinto petis, ke per lia donaco oni organizu konkursojn pri lingvopraktiko aŭ pri varbado. Oni decidis unuan konkursan pri varbilo (vidu apartan anoncon).

Dum la 56-a Nacia Kongreso de Esperanto, ĉe Pentekosto, ni kune partoprenos Sanktan Meson en preĝejo proksima de la Kongresejo. Flugfolion oni tiam disdonos al la neesperantistaj paroĥanoj.

Inter la ĉeestintoj nur S-ro SIMONNET supozeble iros al la Internacia Kongreso en VALENCIA. Oni petis, ke li tie reprezentu la Ligon.

Oni konfirmis, ke S-ro ROYER respondecu pri la Informado, en rilato kun la Gazetara Servo de U.F.E.--. Sed li bezonas reton de kunlaborantoj.

Speciale necesas unu respondeculo por la agado ĉe Pax Christi; necesas ankaŭ, ke ĉiuj esperantistoj anoj de tiu movado kunlaboru kun li. Cetere decus, ke multaj el ni partoprenu vigle tiun oficialan pacmovadon de la katolikoj, kiel memorigis S-ro FRANGEUL perskribe.

Eble ni povos aperigi kurson de Esperanto en la revuo : "Malades et Missions". Ĝia lasta numero enhavis "leteron de leganto" pri la Internacia Lingvo kaj mallongajn sciigojn pri nia movado.

Oni decidis mondonacon al la Fratoj F.M.C.-

.....

Konkludis F-ino LE BOEDEC : "Ni ne povas fanfaroni pri nia agado en 1963. Sed la flameto ĉiam vivas, atendante novajn instigantojn."

Fine oni lotumis belan libron (Taglibro de Ann Frank, bindita) Gi ricevis S-ro LIGOT.

Post la Generala Kunveno, ni promenis en la parko de la Prio-rejo, admirante la multajn abeluojn prizorgatajn de Frato MARMOU. Kune ni preĝis en la bela kapelo. Ĝoje ni reiris Parizon.

\$
=====

Pèlerinage à Notre-Dame de Bonne-Garde
LONGPONT par MONTLHERY (Seine-et-Oise)

Le Dimanche 21 Juin 1964 -

-
- 10 h 20 : départ : de la Porte d'Orléans (rue de la Légion Etrangère)
CAR Daniel Meyer; prix : 3 Fr 80 - (aller et retour)
 - 10 h 55 : arrivée à Montlhéry--(Longpont à 2 km 500)
ou bien descendre à l'arrêt suivant (Guy Perreux)
qui se trouve à 1 km seulement de Longpont (même prix)
 - 12 h -- : Messe à notre intention à la Chapelle de Notre-Dame.
 - 12 h 45 : Réunion pour déjeuner au Centre d'Accueil, mais chacun
est prié d'apporter ses provisions, le Centre ne sert
ni repas ni boisson.
 - 14 h 30 : Dernière visite à la basilique (12° et 13° siècle)
- Puis, pour les bons marcheurs, promenade et visite
de la Tour de Montlhéry -
Départ de Montlhéry par un des CARS suivants :
- 16 h 40 - 17 h 45 - 18 h 10 -
- Pour ceux qui ne voudraient pas trop marcher,
départ de Longpont à 16 h 20 par un CAR qui les
ramènera à Paris.

Venez nombreux pour rendre un hommage joyeux à Notre-Dame
et lui demander toutes ses grâces.

!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!

EL LA REDAKCIO

C'est pour moi un plaisir, après une longue interruption
causée par mes occupations professionnelles, de reprendre la
rédaction de notre Bulletin.

Plaisir également d'adresser, au nom de tous les lecteurs,
nos remerciements à notre Secrétaire Générale et à l'équipe
parisienne, pour avoir maintenu ~~xxxx~~ durant ces mois, la parution
et l'intérêt du Bulletin.

Durant l'intérim, avouons-le, se sont produits quelques
grincements dans les rouages et les transmissions; tout se remet-
tra en ordre, et nous espérons que personne ne tiendra grief à
quiconque pour ce qui n'a pas tourné rond.

Poursuivons notre tâche; elle mérite nos efforts.

G. VERON.

\$

" " PERSPEKTIVOJ " "

Aperturoj por la menso kaj por la koro
France verkita de Fernando LELOTTE, S.J. - Esperanten tradukita
de Fr. Leotado De Ruyver.

Jen estas la lasta sendaĵo de la Fratoj de l' Karito, kun
la ĵus aperinta N-ro 27 de la revueto "Esperanta Karitato". Sendu
vian adreson al : Frato Arni DECORTE, Krijkelberg, 1, BIERBEEK,
(Belgjo).

=====

KONKURSO

Ni organizas konkurson inter la anoj de nia Ligo.

Temo : Redaktu franclingvan flugfolion por informi pri Esperanto kaj la Esperantista Movado la katolikajn mediojn, (Formato : 13,5 x 21 cm).

Jen aktuala kaj necesa temo; ĉiu el vi povas streĉi siajn fortojn por tio.

Juĝos la Komitato de la Ligo.

La aŭtoro de la plej trafa projekto estos premiita per abono al "Nova Civito" aŭ al "Espero Katolika", por si mem aŭ por persono de li indikita, aŭ, laŭ sia elekto, per libroj el la IKUE-Katalogo.

Viajn konkursaĵojn sendu al F-ino LE BOEDEC, antaŭ la 31-an de Julio 1964.

~~~~~

NE-FERMITA LETERO AL FRANCA PILOTO.

Estimata Amiko,

Via letero tre plaĉis al mi : mi ŝatas vian entuziasmon, la fervoron de via fido en la homaj perspektivoj. Vi sendube estos ankoraŭ pli surprizita, verŝajne, legante, ke tian entuziasmon ankaŭ mi partoprenas. Mi ja admiras la heroaĵon de Gagarin, kaj ankaŭ tiun de Sheppard, pri kiu vi ne parolas, sed kiu estas, kvankam malpli grava kompare kun la unua, ja ne flankelasinda ! Mi ne diras al vi, ke ne pli granda estus mia admiro, se morgaŭ oni informus nin, ke kuracisto venkis la kanceron. Sed fine neniu scias, ĉu iam teknika triumfo ne utilis al la homo, kaj ni esperu, ke la kosmaj raketoj iutage estos io alia krom egaj ludiloj. Ĉiaokaze, plena estas nia admiro al la kuraĝo de tiuj, kiuj konsentas la riskojn de tiaj eksperimentoj, kaj ankaŭ al la intelekto, la scienco, la pacienco de tiuj, kiuj sukcesis ilin efektivigi. Tio plifirmigas min en la konvinko, ke la homo estas la mezuro de l'mondo. Ĉu vi konsentas kun mi pri tio ? Sed tio ankaŭ enprofundigas en min la fido, ke la homo kunportas ĉe la frunto la dian fajron, ke li estas la faraĵo kaj la rebrilo de Dio.

Tamem, niaj opinion estas multe pli malsamaj, kiam vi proklamas, ke la heroaĵo de Gagarin stampas etapon ĉe "l'evoluismo". Verdire, mi ne tre bone komprenas, kion vi volas indiki per tio. Ĉu temas pri la teorio de l'evoluo ? - Tamem, mi ne opinias, ke Gagarin aŭ Sheppard, por promeriri tra la kosmospaco, kaj en la kosmospacon, naskis ĉe siaj korpoj novajn organojn. Ili nur plej bone kiel eble utilis la organojn, kiujn la naturo - la evoluo, se vi volas - donis al la homo, interalie la cerbo. Mi konsentas, ke la teknika progreso markita de la heroaĵo de l'unuaj kosmoŝipistoj komencas gravan paŝon de la homara historio. Je la spirita vidpunkto, mi ne estas certa, ke tiu progreso estas tiel konsiderinda, kiel tiu de la nuklea energio kaŭzita. Mi plivole lokigus tiun okazon samnivele kun la malkovro de la tajlita siliko fare de la prahomoj de la kvaterna erao, malpli gravega ol la eltrovo de la fajro.

EL Daniel Rops, tradukis B. Jahier. (Sekvota)